

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO




N° 206 OKTOBRO 2000

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE
POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta PIO X-a, preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



Sommaire/Enhavo

	Pages/Paĝoj
Le mot du président- <i>La bileto de la prezidanto</i>	3
Prière - <i>Preĝo</i>	5
<i>Solidareco</i>	6
<i>Ehoj el la kontinentoj</i>	8
<i>En nia Asocio</i>	10
Pilgrimo de Lisieux	13
Kalendaro	16
Anoncoj	17
Abonnements - <i>Kotiztabelo</i>	19

ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO

Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
Sendinto 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

Motif de non distribution

- Adresse insuffisante
- N'habite pas à l'adresse
- Refusé
- Autres

Périodique Semi-routé

PORT PAYE

COLMAR (68)

Preĝejo de la vilaĝo CALINESTI apud Baia-Mare en RUMANIO. Ĝi estas en konstruado kunlabore kun la parokanoj de Wintzenheim (Alzaco) (Vidu artikolon en la bulteno)

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto. Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaŭ la 10.a de decembro 2000. Venonta bulteno aperos fine de septembro.

Finpresado la 21/10/2000

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Nro 206 Oktobro 2000

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E.)

CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:

S-ro A. BESSIERE
28, Rue C. St-Saëns
76000 ROUEN

Sekretario:

F-ino A.M CHANEY
56, Rue Corvisart
75013 PARIS

Kasisto :

S-ro G. VILLENEUVE
14, Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto :

P-ro L. BOURDON
7, Av. Salomon
59800 LILLE

Peranto IKUE:

S-ro M. COLLEU
3, Allée du Beaujolais
93270 SEVRAN

Redakcio :

Fam. BASSO-RESCIO
9, Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM

Fakse 0389794333

Rete 100623.3022@Compuserve.com

Le Mot du Président

Après la période des vacances il nous faut prendre un nouvel élan pour promouvoir notre action en 2001 et continuer à témoigner de notre foi au sein du mouvement espérantiste.

Vous le savez déjà, nous aurons du 4 au 8 mai 2001 notre congrès-pèlerinage à Lisieux sur les lieux que Sainte-Thérèse a marqués de son empreinte et de sa spiritualité.

Je pense que ce choix est judicieux. Sainte Thérèse a marqué son époque et reste pour nos contemporains un modèle de confiance en Dieu, d'ouverture au monde et d'amour d'autrui. En nous retrouvant quelques jours dans la ville, qui sans elle, ne serait qu'une bourgade inconnue du grand public, nous comprendrons mieux combien sa pensée était proche de l'idéal espérantiste. Elle s'intéressait au monde entier, notamment aux lointains pays de missions et se passionnait pour le travail des missionnaires. C'est dire qu'elle considérait, en bonne disciple du Christ, que tous les hommes sont frères, quelles que soient leur race ou leur langue.

Si elle avait pu connaître la langue internationale, nul doute qu'elle l'aurait volontiers utilisée pour correspondre au loin et rayonner sa foi auprès d'amis lointains.

Pensons donc à elle quand nous écrivons à nos amis étrangers et sachons, comme elle, exprimer notre foi tout en respectant la personnalité, la culture et les traditions de ceux auxquels nous nous adressons avec un cœur sincère et compréhensif.

La Bileto de la Prezidanto

Post la libertempa periodo ni devas ekkuri por disvolvi nian agadon en 2001 kaj daŭre atesti pri nia fido meze de la esperantista movado.

Vi jam scias tion: ni havos nian kongreson kaj samtempe pilgrimon en Lisieux de la 4-a ĝis la 8-a de majo 2001. Tio estos la unua fojo, kiam nia asocio iros sur la loko, kiun Sankta Tereza stampis de sia spuro kaj spiritualeco.

Mi opinias tiun elekton saĝa . Sta Tereza stampis sian epokon kaj restas por la nuntempaj homoj modelon de konfido al Dio, de malfermo al la mondo kaj de amo al la aliuloj. Retrovinĝante dum kelkaj tagoj en la urbo, kiu sen ŝi estus nur urbeto nekonata de la publiko, ni pli bone komprenos, kiom ŝia penso estis proksima al la esperantista idealo; ŝi interesiĝis pri la tuta mondo, precipe pri la malproksimaj misiolandoj kaj pasiĝis por la laboro de la misiistoj. Tio signifas, ke ŝi konsideris, kiel bona disciplo de Kristo, ke ĉiuj homoj estas gefratoj, kiaj ajn estas ilia raso aŭ lingvo.

Se ŝi puvus ekkoni la internacian lingvon, sendube ŝi volonte uzus ĝin por korespondi malproksimen kaj radii sian fidon ĉe malproksimaj amikoj.

Ni do pripensu ŝin, kiam ni estas skribantaj al niaj eksterlandaj amikoj kaj ni sciu, kiel ŝi , esprimi nian fidon, tamen respektante la personecon; la kulturon kaj la tradiciojn de tiuj, al kiuj ni direktas nin kun sincera kaj komprenema koro.

TAGMEZO

Tagmezas . Mi vidas la preĝejon malferma.
Necesas eniri.

Patrino de Jesuo-Kristo,
Mi ne venas por preĝi.

Mi havas nenion por oferti kaj nenion por peti.
Mi nur venas , Patrino
Por rigardi Vin.

Rigardi Vin, ĝojplori,
Scii tion,

Ke mi estas via filo kaj vi ĉeestas
Nur momente
Dum ĉio haltas.

Tagmezas. Esti kun Vi, Maria,
En tiu loko, kie vi ĉeestas,

Nenion diri, rigardi vian vizaĝon,
Lasi la koron kanti en ĝia propra lingvo.

(Paul Claudel)

Vitralo de Sankta Tereza
en la paroĥa preĝejo
de Sankt'Anton am Arlberg
(Tirolo - Austrio)



Solidareco

Intervjuo de Pastro Menny ,parokestro de Wintzenheim apud Colmar(68).

FKE: Ĉu vi jam estis en Rumanio ?

Pastro Menny: - Jes, plurfoje . Unue , en Junio '90, post la eventoj de la revolucio por akompani al Francio 50 rumanajn gejunulojn, kiujn trapasis belegajn feriojn en Alzaco.

Poste mi iris al tiu lando 5 aŭ 6 fojoj por diversaj solidarecaj kaj helpaj agadoj al tiu vilaĝo Calinesti kaj al la orfejoj de tiu regiono.

FKE: Kial Rumanio ?

P.M.: - Ho, estas longa kaj bela historio, kiu datumas de mia dekjara aĝo . Miaj gepatroj donacis al mi poŝtmarkan albumon kaj mia avo havis belan kolekton de rumanaj poŝtmarkoj. Li patience rakontis al mi la historion de tiuj poŝtmarkoj .

En 1917 li estis grave vundita en Rumanio kaj oni alportis lin duon-morta en sia naskiĝa vilaĝo Buhl (Alzaco) .

Iom poste iu frapis al sia pordo : estis rumana soldato, fuĝinta de la militkaptita kampadejo de Soulmatt (Haut-Rhin), tenita de la germanoj .(En tiu epoko Alzaco apartenis al Germanio) . Li petis rifuĝejon kaj senhezite mia avo kaŝis lin en sia kelo ĝis la fino de la milito. Poste ili korespondis regule

inter Rumanio kaj Francio .

En 1989, kiam mi vidis la teruran situacion de la rumana popolo, mi kredis aŭdi la voĉon de mia avo , kiu murmuris en miaj oreloj :

“ François, vi devas fari ion .”

FKE: Kiu estas viaj projektoj nuntempe kun Rumanio ?


P.M.: - Daŭrigi la helpon al la vilaĝo de Calinesti por fini la konstruon de la preĝejo, diversaj humanitaraj helpoj kaj interŝanĝoj de amikeco. Por tion , bezonus monon . Kaj mi ,pastro de Wintzenheim, ne havas pli da mono ol la pastro de Calinesti, do ni devas elturniĝi por trovi ĝin .

La vilaĝanoj de Calinesti interŝanĝe donacis al la pastro Menny krucon.

Tiu ligna kruco estis lokita en la parko de la “Chapelle Notre-Dame”.

Ĝi estas la simbolo de la Pasiono de Kristo sed ankaŭ de la solidareco kaj amikeco inter la du popoloj kaj urboj.

Calinesti-Wintzenheim.



EHOJ EL LA KONTINENTOJ Laŭ Letero de Taizé

La rilatoj inter la kristanoj el Kamboĝo kaj la komunejo de Taizé ekzistas delonge.

En 1997 du junuloj trapasis unu semajnon en Taizé. Kun la parokestro de Phnom Penh ili malkovris iun preĝmanieron por si tutnova, kun silentmomentoj kaj kantoj samtempe simplaj kaj belaj . Tiun restadon antaŭis vizitoj al Kamboĝo de frato el Taizé, invitita de l'episkopo de Phnom Penh.

Por Ratana, tiu mallonga restado en Taizé estis unika sperto.

Dank'al tiu preĝmaniero, kunkantado kaj silenta sintenado antaŭ Dio, malfermiĝis por ili horizontoj tutnovaj. Denove en Kamboĝo Ratana, Bou Nara kaj Pastro Werechāi sin demandis kiel transdoni tion, kion ili kune malkovris . Ili kmerigis kelkajn kantojn kaj poste preparis preĝojn el tiuj kantoj.

Nune trideko de tiuj kantoj estas tradukitaj kaj meditataj preĝoj okazas en lokoj multnombraj . Nun ili ofte estas la unuaj kantoj lernitaj de la katekizatoj. Kiam Ratana parolas pri la preĝo li laŭvice nomas plurajn aspektojn por li gravaj . Unue la kantoj kvietas, meditas kaj kondukas niajn korojn al Dio. La elekto de la bibliaj tekstoj, prefere mallongaj, helpas por asimili la mesaĝon, kiun ili alparolas al ni. La meditado de tiuj eroj simplaj estas profitigaj ĉefe por la novkristanoj aŭ por tiuj , kiuj sin preparas al la bapto. Ratana donas ankaŭ gravecon al la preparo de la preĝloko, por ke ĉio konkrete direktiĝu krucen , Pasionen, Kristen.

Taizé nun akceptas ĉiujare du junajn kamboĝanojn por restado plurmonata. Ĉi-jare temis pri Mam Roth Mouny, juna familipatro deveninta de kristana medio el Phnom Penh kaj sekretariino Sam Anita. Ekde kiam

iu klarigis al ŝi la signifon de la kruco, kiun ŝi havis ĉirkaŭkole, ŝi ekserĉis kion signifas eklezio kaj kredo. Dum ambaŭ impresiĝis de la preĝado kaj la silento, ilin ekkaptis ne malpli la profundo de la renkontiĝoj kun aliaj gejunuloj dum ilia restado. Mouny emociiĝis pro la reciproka fido tiel simple vivata tagon post tago kaj meze de tiom da personoj kun tia diverseco. Ankaŭ Anita frapiĝis de la neĉeesto de baroj inter la homoj. Si nun en Phnom Penh intencas partoprenigi tiujn malfermiĝon kaj kontaktfacilecon al la aliaj. Akceptante la novajn eklezianojn ŝi klopodas estigi ligojn transe de la nura liturgio.

Ĉi-jare okaze de la kamboĝa jarvizito de unu frato el Taizé la kantoj estis unuafoje kantitaj kun kristanoj el aliaj konfesioj, ĉefe dum renkontiĝo malfermita al ĉiuj en Kompong Cham.

Ankaŭ unuafoje la "1999-2001a" letero de frato Roger estis kmerigita. Pracot You, kiu efektivigis tiun tradukon diris : "Laborante mi komprenis, ke tiuj ideoj simplis sed tamen profundis. Ni jam spertis pri tiuj aferoj sed tiu letero igas , ke ni pli profunde pripensu ilin ". Por ŝi, tre engaĝiĝanta en la eklezia vivo en Kamboĝo, la kantoj meditataj permesis al la junuloj denove aliri la preĝon kaj la internan vivon.

Por la kamboĝa Eklezio, kiu tiel dolore vivis la periodon de la Ruĝaj Kmeroj, dum kiu sennombraj kristanoj kaj ĉiuj kamboĝaj pastroj estis mortigitaj, mesaĝo de paco, repaciĝo kaj espero reale alportas sencon. Tiu eklezio, kiu siakarne travivis la Kristan Pasionon kaj hodiaŭ plene releviĝas, rekonstruas sin mem kaj en la tuta mondo gejunuloj dank'al sia preĝo povas akompani tiun releviĝon.

tradukis Roger Degrelle el Lettre de Taizé)

EN NIA ASOCIO

Novaj membroj :

S-ro BOZEC Pierre (44)

S-ro DUSSAULT Jean-Guy (64)

G-roj TOURTOIS Jacques (Drome)

Bonvenon al la genovuloj.

RAPORTO AL KOMITATKUNVENO de la 6a de Majo.

**PRI "DIO PAROLAS AL SIAJ INFANOJ" BIBLIAJ
TEKSTOJ.**

NUN KIE NI SITUAS PRI TIU AGADO DE NIA ASOCIO ?

Unue, jen rapida rememorigo de tiu afero .

Kiel ĉiu scias tiu eta Biblio, principe por infanoj, estis kreita en 1979 de la Katolika Internacia Organizo, "Helpe al la Mizerega Eklezio", A.E.D kaj disdonita tra la tuta mondo pere de pli ol 100 lingvoj, krom Esperanto.

Iniciate de Pastro BOURDON, tiu Biblio estis tradukita en esperanton de la Esperanto grupo de Lille, kaj, en 1995, post decidita helpo de Pastro HEROUX, la tasko kontretigi tian eldonon estis konfidita al Sinjoro PONS, kiu ricevis la konsenton de la komitato de nia asocio kaj financon kontribuon.

Poste, ne estis malfacile perfektigi la tradukon, tio kion faris la karmemora Sinjorino VINCENT, kaj ankaŭ malfacile estis havigi la oficialan konsenton de A.E.D kaj de la devigata "Hispana" Presisto.

Finfine, ĉio sukcesis, kaj de Julio 1997, kun aldono en 1999, ni ricevis entute 2048 bibliojn.

Restis la vendado kaj disdonado de tiuj biblioj, peza tasko, kompreneble.

En la hodiaŭa tago oni povas kalkuli.:

Biblioj venditaj500

Biblioj donacitaj1530

Restas por venontaj sendoj.. 378

Tiel, dank'al tiuj kiuj aĉetis niajn Bibliojn, pli ol du trionoj estis donacitaj al niaj nepagipovantaj Esperantistaj Fratoj en la tuta mondo.

Okaze de Internaciaj Kongresoj, Biblioj estis donacitaj surloke por Ĉekio, Pollando, Rumanio, Ukrainio ...

Por la aliaj , la Biblioj estis senditaj perpoŝte, per paketoj da 18 libroj, kaj per speciala prezo.

Tiel ĝis nun ni sendis ilin al 50 landoj en kvar kontinentoj (vidu suben)

La duono da ricevintoj konfirmis bonordon ricevon per leteroj dankemaj pri nia Asocio, kaj ofte kortuŝantaj pro ilia Fido.

Pri la financado de tiu agado, ne estas problemoj.

Fakte, la diversaj kontribuoj de la komenco preskaŭ kovris la aĉetkostojn (ĉ. 10F po Biblio), kaj kiel antaŭvidite, la produkto de la vendoj (ĉ12.000FF) kompensis la elspezojn, kaj interalie la sendon de donacitaj libroj.

Pri la estonteco, la presaĵo de pliaj ekzempleroj, laŭ la bezonoj, supozus taŭgan financadon, kaj ankaŭ peranton por respondeci tiun novan agadon.

Koran dankon al ĉiuj, kiuj partoprenis tiun agadon, konforme al niaj idealoj.

La nuna peranto,

Roger PONS

Landoj, kie estis senditaj Bibliojoj.

1. Eŭropo (18)

Albanio, Armenio, Azrbajĝano, Bjelorusio, Bosnio, Bulgario, Estonio, Grekio, Jugoslavio, Kroatio, Latvio, Litovio, Moldavio, Portugalio, Rumanio, Rusio, Slovakio, Slovenio.

2. Afriko (11)


Eburbordo, Ganao, Kamerunio, Kenjo, Kongo(D.R), Kongo(D.P), Madagaskaro, Niĝerio, Tanzanio, Togolando, Zambio.

3. Azio (9)

Bangladeŝo, Ĉinio, Hinda Unio, Irano, Kamboĝo, Libano, Malajzio, Pakistano, Tajlando.

4. Ameriko (12)

Argentinio, Belizo, Bolivio, Brazilo, Gvatemalo, Haitio, Kolombio, Kubo, Meksiko, Nikaragvo, Panamo, Peruo.



PILGRIMO en LISIEUX

Ni pilgrimos en Lisieux de la vendredo, la 4-a de majo posttagmeze ĝis la mardo, la 8-a de majo 2001, post la matenmanĝo.

Ni kune loĝos en "Foyer Louis et Zélie Martin", 15 avenue Ste-Thèrese, 14100 LISIEUX -Telefono :02 31 62 09 33 . Tiu religia domo staras je 900m. proksimume de la stacidomo, en strato iranta al la Baziliko.

Bonvolu alporti viajn buŝ- kaj tualet-tukojn.

La prezo estas 1050 FF; ĝi entenas la tranoktadon, la tri tagajn manĝojn kaj la tuttagan ekskurson.

La aliĝkotizo estas :

-ĝis la 15-a de februaro 2001 : 60 F

(Geedza paro 90F)

-ekde la 16-a de februaro 2001 : 80 F

(Geedza paro 120 F)

Senpaga aliĝo por junuloj ĝis 25-jara, religiul(in)o, alilandano, blindulo.

La limdato por aliĝi estas la 1-a de aprilo 2001.

La pago estos farita al Association catholique Française pour l'Esperanto CCP Rouen 324 93 N kaj la aliĝilo sendita al S-ro G.Villeneuve, 14 Rue du Clair de Lune 91530 SAINT CHERON, kune kun la pago.

PROGRAMO DE LA PILGRIMO
EN LISIEUX

Vendredon la 4-an de majo 2001

Posttagmeze : akcepto de la partoprenantoj
18.00 Diservo
20.30 Interkona vespero. Ekzercado de la kantoj.

Sabaton la 5an de majo

09.30 Prelego de Pastro Girault pri Sankta Tereza kaj esperanto
14.15 Vizito al la urbo (katedralo Sta Petro, baziliko ktp)
18.00 Diservo
20.30 Distra vespero.

Dimanĉon la 6an de majo.

09.30 Ĝenerala kunveno
11.00 Komitatkunveno
14.15 Vizito al la lokoj, kie vivis Sta Tereza (Les Buissonnets, Carmel, ktp)
18.00 Diservo
20.30 Amuza vespero.

Lundon la 7an de majo

09.00 Ekskurso al la palaco St Germain du Livet
14.00 Ekskurso al Honfleur
18.00 Diservo
18.00 Diservo
20.30 Adiaŭa vespero..

Mardon la 8an de majo

Post la matenmanĝo, fermo de la kongreso.
(N.B. Tiu programo estas provizora .)

Kongresa Aliĝilo

(Tondu aŭ kopiu kaj sendu al s-ro Villeneuve, nepre antaŭ la 1-a de aprilo 2001)

NOMO kaj VOKNOMO :

ADRESO:

NASKIĜDATO (nur por junulo) :

 Mi aliĝas al la pilgrimo en Lisieux kaj pagas al ACFE :
Aliĝkotizo :
Restado :
Donaco (libervola)

Mi deziras loĝi en unulita ĉambro en dulita ĉambro kaj dividi ĝin kun :

Mi alvenos en Lisieux per aŭto/trajno la an de majo je la horo kaj foriros laan de majo je la horo.

Dato

Subskribo.

KALENDARO

2001

Julio SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomyšl
 20-a IKUE E-Tendaro.
 ĝis Ĉiu tendara tago komenciĝos per
 esperantlingva Sankta Meso en tendara
 ? frateca kaj amikeca etoso. Venu travivi
 en ĉarma naturo belan semajnon en la
 Jaro de la Granda Jubileo .
 Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas
 haveblaj ĉe : IKUE-Katolika Sekcio
 Trsicka ul.6 CZ-751 27 PENCICE .

14/07 ZAGREBO(Kroatio)
 ĝis 15-a Ekumena kongreso
 21/07 54-a IKUE-kongreso
 51-a KELI kongreso
 5-a Junulara Ekumena Tendaro

25/07 ZAGREBO (Kroatio)
 ĝis 86-a Universala Kongreso de Esperanto
 01/08

STRASBOURG (Francio)
 29/07 57-a Internacia Junulara Kongreso
 www.esperanto.org/ijk2001
 ĝis Estos biciklan karavanon el
 05/08 Londono kaj el Barcelono.

ANONCOJ

01/ Taize en esperanto.

Aperis la fama "Lettre de Taizé" en
 esperanta versio . La kotizo estas de 7
 euroj por dujara abono (50 FF)
 informoj ĉe: Reinhard Pfüger
 Deutschherrnufer 45
 DE-60594 FRANKFURT
 Germanio
 Tel: 00.49.695978467
 Rete:reinhard.pflueger@esperanto.de

02/ El Rumanio (laŭ Espero Katolika)

En Gyergyoszentmiklos (Gheorgheni-
 Rumanio) okazis la 27-an de majo
 ordino de IKUEJ-ano Kemenes Lorant .
 Samloke okazis lia unua Meso la 28-an
 de majo. Li studis teologion en
 Esztergom (HU) kaj nun li en sia
 patrujo servos Dion kaj la popolon.
 Salutmesaĝoj bonvenas al la jena
 adreso: Kemenes Lorant , str. Miron
 Cristea 1, RO-4200 GHEORGHENI
 Rumanio rete; loripap@yahoo.com.

03/ El "Chemin de Vie Nro 13" de la
Kristana Organizo por la Adopto.

Meditado :

Kristo ne havas manojn.

Li havas nur niajn manojn.

Por fari sian laboron hodiaù.

Kristo ne havas piedojn.

Li havas nur niajn piedojn.

Por konduki la homojn sur sia vojo.

Kristo ne havas lipojn.

Li havas nur niajn lipojn.

Por paroli pri li al la homoj.

Kristo ne havas helpojn.

Li havas nur niajn helpojn.

Por meti la homojn liaflanke.

Ni estas la nura Biblio.

Ke la publiko ankoraù legas.

Ni estas la lasta mesaĝo de Dio,

Skribita en aktoj kaj en paroloj.

Anonimulo de la XIVa JC.

En la komenco, kelkaj familioj ,kiuj jam spertis adopton de "malsimilaj" infanoj, malfortaj por agi fronte al la multnombraj infanoj en atendo, decidis unuigi por alvoki aliajn gepatrojn adopti "tiuj,kiujn neniu volas" .

La kristana kredo viviglas ilin, sed ne estas standardo por ili. La asocio "Chemin de Vie" estas permesita organizo por la adopto kaj laboras kun la servoj de "l'Aide à l'Enfance en France" en 18 departementoj.

Kontakto: Chemin de Vie

10,Rue de la Robertsau

67800 BISCHHEIM.

AUSKULTU VATIKANAN RADION

En esperanto la elsendoj okazas en tri tagoj de la semajno , en la sama horo 21.20 MET

DIMANĈE - Horo 21.20 laù mezeùropa tempo (10')

Mezonde :527 kaj 1530 kHz Kurtonde 4005 (74.90 m),

5880 (51.0m)

Satelite : INTELSAT 325,5° East 4097.75 Mhz Polarizadon

LHCP

MERKREDE kaj JAUDE : Horo 21.20 MET

Mezonde 1611 kHz,Kurtonde 7250(41.37m),9645(31.10m)

Satelite: INTELSAT 602.62° East 4097.100 Pol.LHCP)

Interreto: sama horo

http://www.vatican.va/news_services/radio/multimedia

aù <http://www.vaticanradio.org>)

Kotiztabelo 2000

I.K.U.E kun "Espero Katolika"

Peranto : S-ro M. COLLEU

95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES

P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE .

A.C.F.E kun "Franca Katolika E-isto unuopulo :

geedza paro : 60 9,15

gejunuloj ĝis 25jara, pastro,religi(in)o : 80 12,20

bonfaranto : 30 4,57

200 30,50

Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 3ème trimestre 2000

C.P.P.A.P : N° 62532

Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM

Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris

sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996

Directeur : Albert BESSIERE

Directeur délégué: Michel BASSO

Frankoj Euroj

164 25,00